JARA ABONO: 1 NF

# SUDFRANCA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio « Languedoc-Roussillon »

*5, Quai Vauban,* **PERPIGNAN** *(P.-O.) - Telefono 34-38-84*

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o- NUMERO 2 -o-o-o- APRILO 1961 -o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

KIAL NI REDAKTAS NIAN BULTENON "SUDFRANCA STELO" TUTE EN ESPERANTO ?

Ĉar ni opinias ke la esperantistoj kaj eĉ la lernantoj devas iomete cerbumi por legi esperantajn tekstojn. Se oni ĉiam sekvas tiun faman "facilecan solvon", kiu estas paroli kaj skribi nacilingve, ni neniam progresos kaj neniam povos bone paroli kaj skribi en Esperanto. Bona ekzerco estas la legado de "Sudfranca Stelo" kaj tradukado franclingven en la kursoj. Ne plu devas esti eternaj komencantoj, sed progresantoj. Tial ni preferas legi aŭ aŭdi paroli eĉ kun kelkaj eraretoj esperante ol nacilingve. Ni devas profiti ĉiujn okazojn por praktiki la lingvon, kaj la legado de "Sudfranca Stelo" estas sendube unu el tiaj okazoj. Jen kial nia bulteno estas tute verkita esperantlingve.

R. L. W.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

## D I M A N Ĉ O N 3 0 an D E A P R I L O :

### REGIONA RENKONTIĜO EN A R M I S S A N (Aude)

La esperantistoj de Languedoc-Roussillon estas kore invitataj partopreni la Regionan Renkontiĝon kiu okazos la dimanĉon 30an de Aprilo 1961 en ARMISSAN (Aude). La Esperanta Grupo de Armissan preparas bonegan akcepton al ĉiuj partoprenontoj. Kunveneto okazos je la 10a matene ĉe la Urbodomo. Salutos la esperantistojn nia eksterlanda gasto S-ro. Dario Rodriguez Lopez de Silva, el Madrido. La esperantistaj vizitantoj povos ankaŭ ĉeesti la konkurson de bicikla kurado kiu okazos tiun saman tagon en Armissan, kiel ankaŭ aliajn festajn aranĝojn.

Jam oni anoncis karavanon de Perpignan kiu veturos aŭtobuse. Ni esperas ke ankaŭ en aliaj urboj oni faru similajn aranĝojn. La karavano de Perpignan veturos tagmeze al NARBONNE-PLAGE, kie oni tagmanĝos (oni kunportos la manĝaĵon) kaj tuj poste ĝi revenos al Armissan.

Pro la situo de tiu ĉi ĉarma urbeto, tute proksime al Narbonne, ni esperas ke multaj esperantistoj el la proksimaj regionoj partoprenos tiun ĉi gajan amikecan renkontiĝon.

NENIU ALIĜKOSTO ! VENU TUTE SIMPLE KAJ VI ĜUOS TRE AGRABLAN TAGON !

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## V I P O V A S F A R I V O J A Ĝ O N Ĉ I R K A U L A M O N D O

### PARTOPRENANTE LA KONKURSON "LES INCONNUS CELEBRES"

Unua premio 30.000 NF. kaj pluraj aliaj gravaj premioj

En la numero de "Paris-Match" de la 25a de **Marto** oni publikigas la normojn de la konkurso, sed vi povas ankaŭ peti la broŝuron "CONCOURS LES INCONNUS CELEBRES" al la jenaj adresoj:

- Al la B.N.C.I. (Banque Nationale pour le Commerce et l'Industrie) plej proksima;
- aŭ per letero al Radio-Luxembourg, Radio-Andorre aŭ Radio-Montecarlo.

Kiam vi havos la revuon aŭ la broŝuron, vi devos fari liston de la 15 eminentuloj tie menciataj, inter kiuj troviĝas D-ro. Zamenhof, kreinto de Esperanto, laŭ la ordo de graveco kiun vi konsideros oportuna. Kompreneble, ni esperas, ke vi metos la nomon de D-ro. Zamenhof en la unuan lokon ! En la sekvanta numero de "Paris-Match" (1an de Aprilo) aperas komplementa bulteneto ankaŭ nepre sendota por partopreni la konkurson. Tiu ĉi dua bulteneto aperas kune kun la unua en la broŝuro de B.N.C.I., tial ni rekomendas al vi peti la cititan broŝuron al la Banko aŭ al la radiostacioj.

## INTERŜANĜOJ INTER LA GRUPOJ DE CRAILSHEIM KAJ PERPIGNAN

La Esperanto-Rondo de Crailsheim (Germanujo) deziras akceli la korespondadon kaj la interŝanĝojn inter la esperantistoj de ambaŭ urboj. Ni petas al ĉiuj, kiuj interesiĝos pri tiu ĉi propono bonvolu sciigi tion al la sidejo de la Kultura Centro Esperantista, 5, quai Vauban, Perpignan. Niaj gesamideanoj el Crailsheim povos interŝanĝe gastigi esperantiston aŭ esperantistinon el Perpignan dum periodo inter 2 kaj 5 semajnoj. La koncerna profitanto de tiu ĉi aranĝo devigas sin gastigi esperantiston aŭ esperantistinon el Crailsheim dum la sama tempo.

Dum la unuaj tagoj de la monato Majo vizitos Perpignan ĉarma ambasadorino el la Grupo de Crailsheim, S-ino. Emmy Maass. Ŝi estos plej kore bonvenata.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

## 2ª E S P E R A N T I S T A P E D A G O G I A S E M A J N O

Sub la aŭspicioj de la Ministerio pri Nacia Edukado, la Dua Esperantista Pedagogia Semajno okazos en Perpignan dum Majo 1961. La prelegoj kaj kunvenoj okazos ĉe la Seminario por Instruistoj kaj Lernejo "Racine", kun la partopreno de la profesoroj André Ribot (Marmande), Léo Lentaigne (Montpellier), René Llech-Walter (Perpignan) kaj Darío Rodríguez López de Silva (Madrid).

Oni povas ricevi informojn de la Kultura Centro Esperantista, 5, quai Vauban, PERPIGNAN.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## 46ª UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN HARROGATE (Britujo), 5 - 12 AUGUSTO 1961

La 46ª Universala Kongreso de Esperanto okazos samtempe kun la Unua Internacia Arta Festivalo en la senkompare bela panoramo de la ĝardenurbo Harrogate, en la koro de Britujo. Inter la plej interesaj punktoj de la programo troviĝas la Belarta Konkurso kaj elekto de la "Aŭtoro de la Jaro", la Oratora Konkurso, muzikaj kaj teatraj prezentadoj, fotografa konkurso, la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, kiel kutime farotaj de kompetentaj universitataj profesoroj ĉiulandaj, Junula Vespero, Virina Vespero, Kongresa Balo, ekskursoj kaj laborkunsidoj.

Okazos Oficiala Antaŭkongreso en Londono, kaj paralele al la Antaŭkongreso, okazos la Unua Seminario "Oriento-Okcidento", grava kultura altnivela evento en la kadro de la ĉefa projekto de UNESKO pri reciproka kompreno de orientaj kaj okcidentaj kulturaj laboroj.

Ankaŭ okazos oficiala postkongresa ekskurso tra la pitoreska Skotlando, kun vizitoj al Edinburgo kaj Glasgovo.

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

## K A R A V A N O U. E. F. A L L A K O N G R E S O D E H A R R O G A T E

Nia nacia asocio U.E.F. planas kolektivajn vojaĝojn al Harrogate, kun la avantaĝoj de pli modera kaj konvena prezo. Bonvolu konsulti senprokraste al U.E.F., 34, rue de Chabrol, P A R I S - Xᵉ

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## 53ª NACIA KONGRESO DE ESPERANTO EN EPERNAY (Marne) DE LA 20ª ĜIS LA 22ª MAJO 1961

Jen resumo de la informoj aperintaj en la suplemento al la numero 196 de Franca Esperantisto: Programo: Akcepto en la Urba Teatro, laborkunsidoj, vizito al la ĉampanaj keloj, Balo, Bankedo, Teatra Vespero, ekskurso al Reims. Kotizoj: Kongresano 6,50 , edzino de kongresano kaj gejunuloj 3 NF. Sendu nepre vian aliĝon antaŭ la 20ª Aprilo al "Congrès National de l'U.E.F.", 37, rue des Petits-Près, EPERNAY (Marne).

= = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = = =

## AKADEMIANO DELFÍ DALMAU PRELEGOS EN PERPIGNAN LA ĴAŬDON 13ᵃⁿ DE APRILO

S-ro. Delfí Dalmau, membro de la Akademio de Esperanto, el Barcelono, prelegos esperantlingve la ĵaŭdon 13ᵃⁿ de Aprilo, je la 16.00 horo, en Lernejo Racine, Rue de la Lanterne, Perpignan. Ni kore invitas ĉiujn esperantistojn kaj gelernantojn ĉeesti tiun ĉi altnivelan eventon.